


Kajeroj — — *el la Sudo*



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



Gaston Waringhien



Nº 14 - APRILO - MAJO - JUNIO - 1992



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Sidejo: Strato Sol, 75. E-41003-SEVILLA (Hispanio).

Prezidanto: Manuel López Hernández

Apertado 369. 41080-SEVILLA (Hispanio).

Sekretario: Alberto Franco Remírez

Sol, 83/85. 41003-SEVILLA (Hispanio)

Kasisto: Ramon Manau Torres

Montseny, 5.-piso. 08208-SABADELL (Barcelona) Hispanio.

Redaktoroj de la bulteno:

Antonio Marco Botella

Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º. C.

50002-ZARAGOZA. (Hispanio)

Miguel Fernández Martín

C/Santa Genoveva, 58. 6º. C.


28017-MADRID.- (Hispanio)

Kovrilo: GASTON WARINGHIEN, unu el la figuroj plej elstaraj de nia Movado forpasinta dum la lastaj tagoj de 1991.

ENHAVO:

Alvoko al nia anaro	3.	Paĝo.
Forpasis Gaston Waringhien	4.	"
Sukceso de Esperanto en Televido	5/6.	"
Bonvolu ridi...sed ne tro!	7.	"
IVOE: Nova vortaro diletantece kompilata.	8/9/10.	"
Lorca en la galega lingvo	11/12.	"
La Movado en kaj ekster Iberio	13.	"
Korespondadi deziras	14.	"
Lasta Cefministro de la 2-a Respubliko	15/16/17.	"
Poetoj de Al-Andalus	18/19/20.	"
Originala Poezio	21.	"
Recenza angulo	22/23.	"

NOTO: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.



Alvoko al nia anaro

Jen la okazo inviti ĉiujn membrojn de HALE kaj simpatiantojn partopreni en la Generala Asembleo de la Asocio, okazonta en Merido de la 30-a de aprilo ĝis la 4-a de majo 1992 samtempe de la 52-a HEF-kongreso.

Gravaj motivoj kunvokas vin al nia Asembleo: HALE-problemoj preme akumuligas jam de monatoj. La Meridaj tagoj taŭgu por pridiskuti kaj solvi rapide kaj konvene la problemoj de la hispana LEA-familio.

Tiuj problemoj precipe naskiĝis pro la normala erozio de la aktivado de niaj gvidantoj. Nia Asocio postulas ĉiutage pli da laboro, pli da sindonemo; tiuj klopodoj pezas ĉiam sur la ŝultroj de samaj malmultaj homoj kaj iam oni devas elekti inter nia privata vivo kaj tiu de la Asocio. En kelkaj kazoj la responsuloj restas firmaj, en aliaj tute ne. Kiam la reagoj de unu aŭ pluraj el niaj kolegoj estas negativaj trafas nin ia paraliziga ankiлоziĝo de la Asocio. Guste kiel nun.

En la Generala Asembleo de HALE (Valencio 1988), oni saĝe decidis limigi la mandaton de estraranoj kaj redaktoroj al unu jaro. La plenumo de tiu decido sendube solvintus nian delikatan situacion, sed verŝajne, ni preferis resti surdaj al eventualaj demisioj aŭ ŝanĝoj, kaj lasis putri nian reagon en la nedecido anstataŭ plenumi aŭ plenumigi la tiaman decidon.

Evidentiĝas la bezono renovigi estraranojn kaj redakto-rojn en la venonta kunveno de Merido. Aliaj homoj kun novaj iniciatoj kaj pli konvinkaj argumentoj por disvastigi niajn laboristajn kaj klerigajn celojn okupu la gvidajn postenojn de la Asocio.

Ĝis nun neniu hispana esperantista grupo montriĝis preta defendi kaj disvastigi progresemajn ideojn, sen ajna servuto al ia dogmo aŭ partipolitika formacio. Tio klare mon-tras, ke HALE okupas socipolitikan spacon propran ankoraŭ bezonatan por libere esprimi nian opinion pri ne gravas kio per nia organo "Kajeroj el la Sudo". Ties singulareco estu

nia insista depostulo por idearo progresema kaj moderna, sen la regresemaj limoj de arkaikaj landaj dividoj kaj aliaj fikciaj homaj diskriminacioj. Kurioze, el eksterlando venas al la redaktoroj preskaŭ unuaniman aprobon kaj oftajn laŭdojn por nia ĝisnuna tasko. Ĉu tiu kvazaŭa indiferento de parto el niaj samlandanoj signifas malaprobon al nia linio? Jen alia motivo por debato.

Gesamideanoj de HALE: en tiu ĉi momento speciale grava por nia Asocio, ni petas al vi nepre partopreni en la venonta Asembleo de Merido. Antaŭdankon!

La Redakcio.

Forpasis Gastón Waringhien

La pasintan 20-an de decembro forpasis prof. Gaston Waringhien en sia 90-jaro, lasinte nin orfaj de la plej granda nuntempa majstro de Esperantio. La esperantistaro perdis sian plej eminentan talenton kaj kreinton de verkaro profunde riĉiĝinta nian kulturon.

Malnova SAT-ano, internaciisto, homo kun homamaj konvinkoj, li ĉiam sentis sin antaŭ ĉio membro de la homaro kaj dediĉis sian longan vivon al erudicia tasko, tiel multfaceta, ke oni dubas ĉu pli elstarigi lin en unu aŭ alia fako de tiu ampleksa kampo beletra, lingvista kaj kleriga, kiujn li kulturis.

Ni, esperantistoj, nur malfacile forgesos tiun giganton de la Esperanta kulturo, ĉar Waringhien estas jam parto de nia historio: kiam ni konsultos PIV-on, studos liajn originalajn eseojn, analizos PAG-on kaj legos liajn majstrajn poezitradukojn, ni estos fakte kun li kaj iel dividos lian pensadon, lian verkaron...

HALE kaj la Redakcio de "Kajeroj el la Sudo" plenfervore omaĝas la forpasintan majstron, kiun ni tiom admiris dum longaj jaroj.

La Redakcio.



Sukceso de Esperanto en televido

La pasintan 4-an de februaro Ana Manero (aktiva kaj konata HEF-anino) kaj k-do Miguel Fernández (kunredaktoro de "Kajeroj"), invitite de "Canal SUR" (aŭtonoma andaluza televidkanalo), kiu malavare kovris iliajn flug- kaj manĝokostojn, estis intervjuitaj en la programo-magazino Mediodia (Tagmezo).

Jam dekomence "Canal SUR", evidentigis plej favoran -neniam favoraĉan- sintenon al nia afero: la intervjuisto, Rafael Cremades, faris la prezenton en senpeka Esperanto. Tuj poste, enkonduka raporto. Sur ekrane, sugestiaj videobildoj pri la lingva monda ĥaoso, kaj niaj solvoj kaj proponoj, klare kaj klare vortumitaj de grupo da junaj esperantis-

toj el diversaj partoj de Hispanio, ĵus kunvenintaj en Almonaster (Huelva, Andaluzio): Georgo Kamaĉo, Manuel López (la HALE-prezidanto) k.a. -juno kaj vervo- en brila kaj nuntempa argumentado.

Ree en la studio kaj en rekta elsendo, Cremades, ripetinte en la hispana sian esperantan prezenton, komencis sian serion da demandoj al Ana kaj Miguel. Demandoj interesaj, ne konvenciaj -verŝajne por la unua fojo oni eĉ ne aludis al la nombro da e-istoj en Hispanio- ne stultaj sed taŭgaj por elstarigi la pozitivajn flankojn de Esperanto kaj elmontritis vivantecon per la forto de la faktoj: Ana -elokventa, ĉarma-, prezentita kiel instruistino pri la angla -kia atuto!- tamen fervora esperantistino pro simpla kialo: nia lingvo donis al ŝi, krom kontaktoj kun homoj el la tuta mondo, gejunulaj renkontiĝoj... multege pli en multege malpli da tempo.

Kaj Miguel, jam sperta pri "toreado sur tiaj arenoj",

kies trafaj respondoj vekis grandan intereson, kaj kies libroformaj e-tradukoj pri verkoj de la hispanaj poetoj Miguel Hernández kaj Federico Garcia Lorca, montrata al la telespektantaro, faris sensacion. Des pli lia rava interpreto de, "Zorongon", de la ĵus menciita F.G.Lorca, kiun li kantis en Esperanto kaj kun gitar-akompano far Cremades mem.

Dek kvar minutoj entute -dek kvar televidaj minutoj!- da jubilo por la andaluzaj e-istoj kaj da efika Esperanta propagando.

Ana kaj Miguel ricevis ardajn gratulojn kaj de la ĉeestanta publiko kaj de la tuta reĝisora skipo, kiu, plie, transdonis al ili belajn donacojn.

Jen la resumo de unu el la -laŭdire- plej bonaj televidprogramoj pri Esperanto, iam ajn realigitaj en Hispanio.

Gratulojn al Ana kaj Miguel pro la sukceso!

La Redakcio.

Bonvolu ridi... sed ne tro!

Ŝparema edzino.-

Revene de la oficejo Francisko trovas sian edzinon senkonsole ploranta. Zorgoplene la edzo ŝin demandas: -Ho, mia amata, kio okazas al vi?- Ĉu vere la problemoj estas tiel gravaj?-

La edzino, inter ploroj, diras: -Ho jes, mia kara, io terura okazis al mi; mi ĵus renkontis nian najbarinon portante saman robmodelon kiel la mia!-

La edzo meditas kaj diras al ŝi: -Lasu min pensi, sed... ĉu, fakte, vi ne celas nur al tio, ke mi aĉetu al vi novan robon?-

La edzino reagas rapida: -Ho, tute ne!. Tamen, se kalkuli bone la aferon, malpli kostus kaj pli simplus aĉeti novan robon, ol transiĝi en alian loĝejon, ĉu ne?

Evidente, ŝi pravis. Multe malpli kostus!



Lasta deziro.- La estro de prizono vizitas mortkondamniton kelkajn horojn antaŭ la ekzekuto kaj demandas al li:

-Kiu estas via lasta deziro?
La mortkondamnito, seriozmiene kaj kun humila akĉento respondas:

-Nur lerni la anglan lingvon!

Ekstertempa nobelo.-

Nokte, sufiĉe malfrue, venas antaŭ - - duonfermita pordo de hotelo orgojla nobelo, kiu senzorge kaj skandale frapas al la pordo.

La akceptisto de la hotelo duondorme demandas: -Kiu estas tie?-

Kaj la nobelo arogante kaj solene krias: -Don Rodrigo Valcarcel de Viñedos y de los Fantasmones de la Septima Cumbre.

La akceptisto jam preta por eklaboro diras: -Antaŭen sinjoroj, kaj bonvolu la lasta lasi la pordon duonfermita, kiel antaŭe!.

Malfacila solvo de problemo.

Surstrate du viroj furioze pugnobatalas unu kontraŭ la alian. Proksime al ili infano ploranta vokas malespere policanon. Surprize, ĉar ne ĉiam, kiam oni bezonas policanon, oni trovas iun, aperas unu, kiu naive demandas la infanon:

-Kio okazas al vi, mia kara!


Inter ĝemoj kaj larmoj la infano respondas: -Jen mia paĉjo batalanta. Certe ke li jam estas grave vundita!

-Sed kiu estas via patro?- demandas lin la policano.

Ha, tion mi ne scias... pro tio ili batalas!

Maria Fernanda

IVOE: nova vortaro diletantece kompilata



En 1990 aperis la "tria -ankoraŭ provaeldono" de Interetna Vortaro de Ordinara Esperanto (IVOE), kompilata de interetna teamo sub la gvidado de Lorens' Mi (=Lawrence Mee) kaj eldonata de Istlia Eldonejo Esperantista. La celo de tiu ĉi nova vortaro estas registri unulingve proks. ses mil ĉiutagajn vortojn bezonatajn de esperantistoj en ĉiuj partoj de la mondo. La bazo de IVOE estas la Baza Radikaro Oficiala (BRO) de la Akademio de Esperanto kune kun ĉiuj oficialaj vortoj de Esperanto ĝis inkluzive la 8-a aldono al Universala Vortaro.

IVOE inkludas ankaŭ oficialajn proprajn nomojn kune kun la landnomoj rekomenditaj de la Akademio de Esperanto. Cetere, enestas ankaŭ multaj ĉiutagaj vortoj devenantaj el diversaj landoj kaj lingvoj, senkonsidere, ĉu ili jam estas registritaj en "Plena Vortaro" kaj "Suplemento" (PVS). Flanka celo de IVOE estas prezenti ĝisdatigitan version de PVS. Ne estas menciite en la Antaŭparolo de la tria proveldono de IVOE, ke PVS jam estas ĝisdatigita en la formo de "Plena Ilustrita Vortaro" (1970) kaj ties "Suplemento" (1987).

Efektive, IVOE ne estas uzebla sen la helpo de aliaj vortaroj, ĉar la ĉefkompilanto Lawrence Mee (LM) apartigas el la vortprovizo de PVS leksikan materialon, kiun li nomas "multaj fak teknikaj vortoj ne-oficialaj" kaj listigas ilin en apendico fine de IVOE sen difinoj. Sekve, por kompreni la signifon de tiaj vortoj, konsulanto de IVOE devas akiri ankaŭ PVS. La instrukcioj por la uzo de IVOE postulas posedon ankaŭ de etnolingva Esperanto-vortaro.

Ekzameno de la enhavo de la 33-paĝa proveldono (literoj A kaj B) malkovras nezorge faritan kompiladon kun nekonsekvencaj vortformoj kaj mankhavaj difinoj. Plue, la elekto de vortoj por registrado en IVOE ne ĉiam estas pravigebla laŭ la nocio de "ordinara Esperanto". Jen kelkaj misaĵoj, kiuj saltas al la okuloj.

LM informas en sia Antaŭparolo, ke propraj nomoj

aperas kun majuskloj, "sed krom tia uzado, majuskloj estas rigore evititaj." Kial, do, jenaj interjekcioj komenciĝas per majusklo: Aha!, Aŭ!, Ba!, Baf!, Bis!, Brave!, Bravisime!, Bum!?

Registritaj en IVOE estas "agronomio" kaj "agronomo", oficialigitaj en la 1-a kaj 7-a Aldonoj al Universala Vortaro respektive. Tamen, pro iu nekomprenebla kialo, la multe pli "ordinara" vorto "biologio" estas klasifita kiel fakteknika vorto kaj aperas sen difino en la apendico, malgraŭ tio, ke "biologio" kaj "biologo" troviĝas en la 1-a kaj 7-a aldonoj same kiel "agronomio" kaj "agronomo"!

Sajnas, ke LM estas tre konfuzita pri la uzo de la vortoj "civitano" kaj "gento". La difino de "anglo" estas "ano de la ĉefgento loĝanta en Anglujo", sed "bulgaro" estas "civitano de la ŝtato Bulgario", kaj "albano" estas nek civitano, nek gentano sed nur "landano de tiu ŝtato...kiu havas la nomon, Albanio". Pli da kaoso montras la traktado de "belgo", kiu estas difinita kiel "ano de la ĉefgento en Belgio". En Belgio nuntempe la du plej gravaj gentoj estas la flandroj kaj la valonoj. Ekzistis belga gento nur en la pasinteco; ili estis keltoj loĝantaj en partoj de la nuna Belgio kaj Francio. Hodiaŭ la difino de "belgo" devas esti "civitano de la ŝtato Belgio". Du nepardoneblaj mankoj en IVOE estas la gentnomo "afgano" apud la registro de "Afganistano" kaj la diskriminacia preteratento de la lando Aŭstrio kaj ties civitanoj, la aŭstroj.

Same kaprica estas la difinoj de landnomoj. Ŝtatoj estas Afganistano, Belizo kaj Bolivio, sed Benino estas respubliko, Butano estas reĝlando kaj Aŭstralio estas kontinento. Por pli racia difinado, oni uzu la vorton "ŝtato" en ĉiu kazo, ĉar respublikoj kaj reĝlandoj povas subite ŝanĝiĝi al aliaj reĝim-formoj. Ĉe la kapvorto "Barbudo" troviĝas la indiko "kontrolu sub Antigvo". Tio ne helpas, ĉar Antigvo ne estas registrita!

Ne eblas kompreni, kial LM signas la verbon "bati" transitiva, dum en PV ĝi estas kaj transitiva kaj netransitiva laŭ la signifo. Ankoraŭ unu fusaĵo rilatas al la verbo "akuŝi", kiu en PV estas transitiva. Post la verbo en la ekzemplaj

frazoj sekvas substantivoj en la akuzativa kazo. Tamen en IVOE, Mee indikas, ke "akuŝi" estas netransitiva verbo, sed li uzas la samajn ilustrajn frazojn de PV kun rektaj objektoj post la verbo!

LM difinas "bastli" jene: "memfari, (aparte kun la senco lerni iun metion per sperto en la metio)". Tio ne akordas kun la difino de Rüdiger Eichholz, kiu enkondukis la vorton: "lude aŭ amatore produkti objekton". Eichholz akcentas, ke grava estas la nocio de ludo, ne de metia manlaboro kun personec-eduka celo.

La difino de "brajlo" ne estas konvena: "speciala skribsistemo por blinduloj". Pli utila difino klarigas, ke temas pri reliefe presitaj punktoj (ne literoj), kiuj estas legeblaj per fingropalrado.

Jam elmodiĝinta vorto estas "apaĉo", do devas esti resendo al la aktuala "huligano". Cetere, LM forgesis menciiri, ke apaĉo estas membro de indiana tribo el Nordameriko.

Pritraktendaj estas aliaj registraĵoj en IVOE, kiuj apenaŭ estas pravigeblaj en vortaro de ordinara Esperanto; inter ili estas: alparo, andono, anzano, baldi, basmo.

Kelkaj aliaj rimarkoj pri IVOE koncernas ĝian planadon kaj tipografian formon. En Brazilo Sylla Chaves jam komencis kompili similan vortaron bazitan sur PV, kiu enhavos ankaŭ ilustraĵojn: Origina Esperanta Bildvortaro (OEB). Estas konsilinde, ke LM kontaktu s-ron Chaves por evito de duobla laboro, kaj ankaŭ por eventuala kunlaboro.

La kompostad-tekniko de IVOE ne taŭgas por konsultlibro. La literoj de la komputero uzata de LM kelkloke estas malfacile legeblaj, specife "g" kaj "p", kiuj plurfoje aperas kiel "o", ĉar la longa piedo de tiuj literoj ne ĉiam estas klare presita. Eĉ pli malbela estas la presado de la kursivaj literoj.

Konklude, la tria proveldono de IVOE donas impreson de diletanta leksikografia laboro. Pro tio, estas esence, ke Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiu aŭspicias la verkon, pli profunde kaj objektive ekzameni sian ligon kun IVOE por ne riski kompromitiĝon. Ĉiuokaze, antaŭ publikigo de la definitiva versio, la teksto de ĉiuj artikoloj devas esti reviziita fare de grupo de esperantologoj kun sperto pri leksikografia laboro

Bernard GOLDEN



LORCA EN LA GALEGA LINGVO

Federico García Lorca, la plej granda hispana poeto dum la lastaj jardekoj, verkis ses poemojn en la galega lingvo. Du el ili estis tradukitaj en Esperanton de nia galega samideano Antonio Alonso Núñez. Trafe kaj zorge.

La temoj de tiuj poemoj ankaŭ estas galegaj aŭ pli bone dirite, prisantiagaj, kio fakte signifas duoble galegaj. La luno santiaga de Federiko elvokas tuj en nia spirito la grizoverdajn pejzaĝojn de Galegio per sonoraj muzikaj versoj: la bravan maron, la pluvon kaj la pinojn, envolvitajn en milda melankolio... Kaj kun tiuj bildoj ĝi sugestas ankaŭ la misteran mondon nerezisteble allogan de ombroj dancantaj en la nokto santiaga "de l'Mortintoj tra l'Korto".

Jen madrigalo de Federiko, kiu bele prikantas la urbon Santiago:

Al la urbo Santiago

Pluvas Santiage
mia amdolĉo.
Blanka kameli'aera
tenebriĝas en sun-fono.

Pluvo vidiĝas trastrate
vitra kaj ŝtona ĝemar'.
Vento vidiĝas svagema
ombro, cindro de la mar'.

Pluvas Santiage
en noktoobskuro.
Arĝenta songoherbaro
kovras la malplanan lunon.

Ombro, cindro de la mar',
Santiago, de l'suno for'.
Akvo de maten'antikva
al mi tremas en la kor'.

Leginte ĉi tiun poemeton, mi ne povas ne elvoki la figuron kaj versojn de Rosalía de Castro, la ĉefpoetino de Galegio, la simbolo de la spirito, pejzaĝo kaj siveco galegaj. Ĝiaj versoj neimiteble portretas la galegan animon kune kaj la propran doloron kiam ŝi skribas:

Mildo kaj splen'baraktis
en la tag'de grizaj tonoj,
dorme pluvis plomb-pluvadis
kun trankvila monotono.
Kaj dum mi dolore larmis,
mia filo, freŝa rozo,
en serena dorm' forpasis.

Sed Lorca, genia poeto malkovranto de sekretaj mondoj, ne restas ĉe la sojlo melankolia de la pejzaĝoj, sed eniras en la animon fantazian de l'galegoj rekreante misterajn scenojn pratempajn, eble plene kompreneblaj nur al galegoj, kiel tiu ĉi poemo:

Danco de luno Santiaga.

De la blanka ĝentilulo
vidu la velkintan korpon!

Ve, filin'! Min blanka igas
ĉielaero per blovo.

Temas pri l'luno dancanta
de l'Mortintoj tra la Korto.(*)

Ne l'aer', sed luno trista
de l'Mortintoj tra la Korto!

Vidu la korpon velkintan,
nigran de lupoj kaj ombroj.

Kiu muĝas ĉi ĝemegon
melankolian de bovo?

Patrino, la luno dancas
de l'Mortintoj tra la Korto.

Patrino: Luno, la luno
de l'Mortintoj tra la Korto!.

Kiun ŝtonĉevalo vundas
pordo-rande de la sonĝo?

Jes, la luno, la luno
kun uleksoj por krono,
dancanta, dance, danca,
de l'Mortintoj tra la Korto!

Temas pri l'luno! La luno,
de l'Mortintoj tra la Korto!

Kun okul'nubplena, kiu
vidas miajn vitrajn mornojn?

Temas pri l'luno! La luno,
de l'Mortintoj tra la Korto!

Lasu min morti surlite
revantan florojn el oro.

Ni devas danki nian amikon
Alonso pro la traduko de tiuj du
poemoj de Lorca, ĉefe ĉar ni bone
scias pri lia prefera inklino al Ekzak-
taj Sciencoj. Lia meritoplena klopodo
fariĝas do ankoraŭ pli dankinda!

Patrino, la luno dancas
de l'Mortintoj tra la Korto.

La Redakcio.

(*)"Korto de l'Mortintoj". Galege, "Quintana dos Mortos" (pr.kintana dos mortos), unu el la famaj placoj en Santiago. "Quintana" estas antikva kaj elvokiva vorto, kies signifo estas placo, korto, k.s. "Mortintoj" memorigas pri antikvaj tombejoj en tiu loko.



La movado en kaj ekster Iberio

Ingrid Goset, "Pubilla Esperanto-92."

En la lasta dimanĉo de Februaro KULTURA ESPERANTISTA ASOCIO prezentis en "Civita Centro de la Creu Alta" fraŭlinon Ingrid Goset, elektita "Pubilla Esperanto-92" en nia Centro.

Fraŭlino Ingrid estas 16-jara esperantistino, kiu de nun kandidatas por la titolo "Pubilla Sabadell-92", kiun pasintjare gajnis alia bela esperantistino: Montserrat Figueres i Torres.

Ingrid Goset

Ni gratulas la novan "Pubilla Esperanto-92", fraŭlinon Ingrid Goset, kaj

deziras al ŝi sukceson!

PRETIGO DE NOVA ELEMENTA CORSO.

Barcelona Esperanto-Centro jam akiris video-aparatojn por filmi, sonbendi kaj kopii videobendojn VHS, kies precipa celo estas nun filmi Elementa Esperanto-kurso. Personoj interesataj povas de nun kontakti kun nia Centro per la telefono: (93) 240,26,62.

INAŬGURO DE ESPERANTO-PLACOJ.

Tri tagojn post inaŭguro de Esperanto-Placo en Berlin (Neukölln), la 15 dec. 1991, la konata Bavara kuraĉloko Bad Kissingen havis sian placon samnoman. La koncerna decido de 1' 18 dec. 1991 fare de la 30-membra urba konsilantaro okazis unuanime.

Bonvena motiviga okazo por la loka Esperanto Grupo en Bad Kissingen, proponi en printempo 1991 al la ĉefurbestro kaj urba magistrato dignan honorigon al D-ro Zamenhof: la 12 jul. 1991 estis la datreveno de la 1-a foja alveno de 1' kormal-sana D-ro Zamenhof por speciala kuracada terapio.

LA MOVADO EN KAJ EKSTER IBERIO.

Kultura Asocio Esperantista oncas la Duan Esperantistan Rendevuon okazonta en la kataluna urbo Vila-rodona (Tarragona) la 7-an de Junio nunjara. En la kadro de tiu evento oni inaŭguros straton kun la nomo **ESPERANTO**. Pliajn informojn petu al la KAE-Prezidanto S-ro José M^a Galofré Domingo; C/. Canonge Joncar, 122. D. 08208-SABADELL.

La 65-a Kongreso de SAT okazos en Kaunas, Litovio, de la 5-a ĝis la 15-a de Aŭgusto 1992. Aliĝ-kontaktadreso: Litova Esperanto-Asocio, 233000 Kaunas -C, ab.k. 167. Litovio.



Livero de la premio "Klara Silbernik" en 1992.

En la kadro de la 52-a Hispana Esperanto-Kongreso okazonta en Merido de la 30-a de Aprilo ĝis la 3-a de Majo, oni liveros al S-ino Maria Paz Roces, edzino de unu el la plej elstaraj esperantistoj de Gijón, s-ano Santiago Mulas, la ĉi-jaran premion "Klara Silbernik".

Hungaria Esperanto-Asocio invitas vin aliĝi al **Internacia Esperanto-Kongreso** en Litovio-Vilnius kun ekskursoj al Baltaj Ŝtatoj, okazonta de la 24-a de Junio ĝis la 1-a de Julio 1992. Diskutoj, ekskursoj kaj bona etoso. Aliĝdato: 15-3-92.

Informoj: HEA; 1368-Budapest. Pf. 193. Hungario.

KORESPONDADI

DEZIRAS...

25-jara fraŭlino, lernantino de muziko kaj modernaj lingvoj, deziras korespondi kun gejunuloj pri antikva historio, sporto kaj moderna muziko. Skribu al jena adreso: Ilina Chichcova, RV Rodina 1. bl. "Zoen planina", vh a, 3 ap. 2; 7005-RUSE (Bulgario).

Ju Korsum (245110) P.O.Box 7. SHOSTKA-7. Sumska obl.

Ukrainio, deziras korespondi pri turismo, kolektoj, k.a. Respondo garantiata.

Kun hispanaj samideanoj, S-ro Artur Michalzki, ul. M. Konopnickiej, 25; 26660 JEDLINZK. Pollando

Pri historio, muziko, turismo, naturo, 44 jaraĝa radioteknikistino. S-ino Ljudmila Kostina; Poŝtkesto 77, u. Blagovesĉensk, Amurskaja regiono 675000. SU.

19-jara studentino pri muziko kaj sporto. F-ino Bai Ildikó, H-2364 OCSA. Némedi ut. 68. Hungario.

59-jara instruistino pri literaturo, popolkutimoj, muziko, ktp. S-ino Viorica Gavrilá, Hipodrom 1 Bl 16 ap. 47; 2400-SIBIU-6. Romano.





Lasta ĉefministro de la 2a Respubliko

La lasta ĉefministro de la Dua Hispana Respubliko, Juan Negrín López naskiĝis en 1889 aŭ 1893, depende de la libroj kiujn oni legas en Las Palmas, Kanariaj Insuloj. Li studis fiziologion, unue en sia naskiĝurbo kaj poste en Madrido. Ni scias malmulton pri lia privata vivo, ĉar li ĉiam estis tre rezervema homo; doktoriĝis en 1921 kaj, aŭ jam antaŭe estis en Germanio, aŭ vizitis tiun landon post tiu dato. Li certe iris tien, kie li studis kaj laboris dum sufiĉe da tempo por flue posedi la germanan lingvon. En Germanio kaj Madrido li elstaris kiel doktoro pri fiziologio, sciencon kiun li studis tre profunde. En 1926 li aliĝis al la Hispana Socialista Partio (P.S.O.E.),

ĉefe ĉar li akiris jam en Germanio sciojn pri la socialisma doktrino kaj tre plaĉis lin. Li neniam estis unu el la plej elstaraj personecoj de la Partio kiel Largo Caballero aŭ Prieto, sed tre inteligenta li fariĝis en 1929 Sekretario de unu el la fakoj de la Civita Universitato de Madrido, kie li laboris, tiam inaŭgurita.

Kiam oni proklamis la nova respubliko en 1931 li estis elektita kiel parlamentano de la Socialista Partio, sed li ne tro elstaris politike dum tiu periodo. En 1933 li lasis la Parlamenton, ĉar ne estis reelektita, sed reeniris en tiu institucio en februaro de 1936, kiam triumfis la Popola Fronto, kaj la socialistoj gajnis multajn voĉdonojn en tiu balotado.

La nomo Negrín aperis en ĉiu ĵurnalo en septembro 1936, kiam Largo Caballero fariĝis ĉefministro kaj tiu ĉi nomis lin Ministro pri Financoj en la respublika registaro, kaj estis en tiu posteno kie li faris bonegan laboron, haltigante kaj regante la inflacion kaj ankaŭ negocante la sendon de la nacia oro de Hispanio al Moskvo por havi ĝin sekura,

ĉar tiutempe jam Franko avancis kontraŭ Madrido, kaj la franca kaj brita registaroj montriĝis inklinaj agnoski oficiale la reĝimon se la generalo konkeros la ĉefurbon.

Negrín silente kaj efike laboris kiel Ministro pri Financoj ĝis la 17-a de majo 1937, kiam la registaro de Largo Caballero falis. Aŭdi la nomon de Negrín kiel ĉefministro, surprizis ne malmultajn homojn. Oni konis lin kiel efikan kompetentan organizanton, kiel scienciston kaj laste kiel laboreman homon en la ministerio, sed estis multaj, same en Hispanio kiel eksterlande, kiuj profetis lian falon kaj tiun de la Respubliko ne pli malfrue ol la jarfino de 1937. Ni scias, ke ne li kaj ankaŭ ne la Respubliko falis en 1937, male, tiu jaro finiĝis kun eble la plej grava batala venko respublikana de la civila milito, tiu de Teruel.

Mi ne intencas detale verki pri la kapableco kaj agado de Negrín dum la intercivitana hispana milito, ĉar multajn librojn jam oni verkis pri la temo, kelkajn favorajn, aliajn malfavorajn prijuĝante tiun malfacilan periodon inter la 17-a de majo 1937 kaj la militfino en marto 1939. Post la malvenko en la hispana milito Negrín veturis al Parizo kiel ĉefministro en ekzilo. Sed li devis forlasi Francion en printempo 1940, ĉar la germanoj invadis la francan teritorion. Nur kelkajn semajnojn antaŭ la germana invado li atingis Londonon, kie li restis dum kelkaj jaroj.

Envenante Londonon li promesis al la brita registaro de Wiston Churchill, ke li faros nenion kiu povu implici iun ajn subtenon de unu partio aŭ alia, kaj efektive li plenumis sian promeson. Post junio 1941, kiam la soveta teritorio estis invadita de la germanoj, la brita registaro montriĝis unuafoje iom pli favora al la respublika kaŭzo, kaj Negrín faris du aŭ tri bonajn paroladojn al la demokratoj loĝantaj tiam en Britio. Dum tiuj tagoj, kiam oni renkontis lin okaze de festoj por solenigi respublikajn eventojn, li ĉiam estis afabla kaj amike konversaciis kun la hispanaj ĉeestantoj. Troviĝis certaj homoj kiuj instigis lin publike paroladi pri la kontraŭ-Franka batalo, sed li ĉiam respektis la kompromison kun la brita registaro ne interveni en la politikon kaj krei diplomatajn konfliktojn.

Finfine, en aŭgusto 1945, hispanaj politikistoj kunvenis en Meksikio kaj decidis ke tiam, post la fino de la tutmon-

da milito, estis la momento oportuna por organizi registaron por iamaniere helpi aŭ enkonduki la respublikan kaŭzon. Negrín, kiu ankoraŭ sin konsideris kiel la oficialan Ĉefministron decidis, ke tiu estis la momento por demisii de tiu posteno. Tiam, la hispanaj deputitoj kunvenintaj en Meksikio decidis elekti José Giral kiel ĉefministro de la ekzilita registaro, okazo kiun D-ro Negrín profitis por definitive forlasi la politikon kaj rekomenci sian taskon kiel biologian scienciston. En Parizo li brile kaj silente laboradis kiel unu plia el tiuj sciencistoj, kiuj tiom malavare laboras por la progreso de la homaro.

Juan Negrín forpasis en la jaro 1956. Li petis al sia filo Romulo, ke li transdonu al la hispana ambasadoro en Parizo la arĥivon enhavanta 168 dokumentojn, kiuj detale atestas pri ĉiuj liaj plej gravaj decidoj kiel Ĉefministro.

D-ro Negrín ne estis homo deziranta famon. Li akceptis la postenon, unue kiel parlamentano kaj poste kiel Ĉefministro celante la modernigon de la lando kaj la progreson de la hispana kulturo. Famo venis al li en septembro 1936, kiam li montris kapablon kaj honestecon metante ordon en la ŝtataj financoj. Poste li akiris tutmondan famon kiel Ĉefministro, ĉar li montris firman karakteron gvidante la Respublikan registaron dum dudek monatoj heroe kaj obstine batalante kontraŭ la internacia faŝismo.

Multajn verkojn oni eldonis pri la hispana milito, sed en neniu el ili Juan Negrín López volis aperi kiel ĉefrolanto de tiuj historiaj paĝoj, li ja preferis preskaŭ malaperi anstataŭ pompe sin prezenti en la unua vico de tiu tragedia historio pri la intercivitana milito. Eble, se iam ni legos tiujn 168 dokumentojn transdonitajn al la hispana ambasadoro en Parizo, ni konos verojn ĝis nun nur diritajn de unu aŭ alia homo, sed sen reala konfirmo.

Amador Diaz



Poetoj de Al-Andalus


LA BIBLIOFILO AL-HAKAM la II-a

Dua kalifo de Kordovo (961-976) kaj filo de la granda Abd-al Rahman la III-a. Lia regado donis al la tuta Iberio (tiam Al-Andalus) longan pacan periodon, apenaŭ interrompita de sporadaj atakoj far normandoj aŭ kristanoj. Neniame en Al-Andalus regis princo pli saĝa kaj inteligenta ol li, kaj tio eĉ konsiderante, ke ĉiuj liaj umajaj antaŭuloj estis homoj tre kleraj, ĉiam inklinaj al kulturaj temoj kaj al la riĉigo de la propraj bibliotekoj. Neniu kiel Al-Hakam serĉis kun pli da fervoro valorajn aŭ rarajn librojn. En Kairo, Bagdado, Damasko, Aleksandrio, li havis inteligentajn agentojn kun la ordono kopii aŭ aĉeti antikvajjn kaj novajn librojn sen priatenti la prezon.

Lia palaco estis plenplena ne nur de libroj, sed ankaŭ de kopiistoj, bindistoj kaj miniaturistoj. Nur la katalogo de lia biblioteko konsistis 44 kajeroj - ĉiu dudekfolia- (laŭ kelkaj) - aŭ kvindekfolia- (laŭ aliaj) enhavantaj nur la titolojn. Kelkaj fakuloj kalkulis, ke la nombro de libroj en lia biblioteko superis 400.000 volumojn(*). Al-Hakam ne nur legis ĉiujn, sed kutime notis sur ĉiu el ili certajn substrekindajn detalojn. Li skribis je la komenco aŭ fino de ĉiu libro la kompletan nomon kaj alnomon de la aŭtoro, tribo, jaro de naskiĝo kaj forpaso, same kiel anekdotoj pri li. Tiuj notoj montriĝis grandvaloraj sub diversaj vidpunktoj laŭlonge de l'tempo.

Al-Hakam konis pli bone ol iu ajn alia la historion pri beletro, kaj tial liaj notoj estas tiel interesaj por al-andalusaj studemuloj. Plej ofte li legis librojn verkitajn en Persio aŭ Sirio antaŭ ol la tiulandaj kleruloj. Iam, informite pri la preparaj esploroj de Abū -l- Farach Isfahâni por verki erudician libron pri muziko kaj kanto, li sendis al la fama iraka verkisto milon da ormoneroj kun la peto, ke tiu sendu la libron tuj post finverki ĝin. Dankeme, Isfahâni komplezis la deziron de la kordova kalifo kaj sendis al li ekzempleron antaŭ ol publikigi libron. La aŭtoro skribis sur la unua paĝo de la teksto poemon honore al la kalifo, laŭde priskribante la umajan genealogion. Li ricevis novan rekompencan pro tiu ĝentileco.

Aliajn ekzemplojn oni povas citi pri la konduto de Al-Hakam en similaj okazoj, kiel tiu pri episkopo de Ĝirono, Gotmar la II-a, aŭtoro de kroniko pri frankaj reĝoj dediĉita al Al-Hakam; aŭ la traduko en la araban de



"Historiarum" de Orosio (plej konsultata verko dum la mezepoko por koni la antikvecon), pagita de la kalifo; aŭ la verkado de "La kalendaro de Kordova" far mozaraba episkopo Rabi ibn Zaid kunlabore kun la araba kuracisto Arib ibn Sad, ankaŭ auspiciata de la kalifo; aŭ la versio en la araban de la greka verko "Planisferio" de Ptolomeo, tradukita de Maslama-al-Mayriti. Kaj same oni povus ankoraŭ menciigi multajn aliajn tradukojn de la araba en la latinan fare de mozaraboj; tradukoj tre taŭgaj por diskonigi en Eŭropo la araba(j)n matematikon kaj astronomion... Tiam oni ekfabrikis en Al-Andalus la paperon, kiun oni eksportis al la kristana Hispanio kaj al aliaj lokoj. Tiaj entreprenoj funkciis ĉiam sub iniciato kaj mecenateco de Al-Hakam.

Ĝenerale, la malavareco de la kalifo al poetoj kaj sciencistoj, same enlandaj kiel eksterlandaj, estis tiel granda, ke ili venis amase al la kordova kortego. Tiun protekton ĝuis eĉ la filozofoj, tre ofte persekutitaj de fanatikaj prudaj religiuloj, tiam kiel ĉiam tre influaj.

Ĉiuj branĉoj de la instruado floris sub la regado de Al-Hakam: la unuagradaj lernejoj estis sufiĉe bonaj kaj multenombraj. En Al-Andalus preskaŭ ĉiuj homoj scipovis legi kaj skribi, malkiel en la kristana Eŭropo, kie nur la pastra-monaha klaso akiris klerigon. Kvankam oni instruis Gramatikon kaj Retorikon en la lernejoj, Al-Hakam taksis la ĝeneralan instruadon ankoraŭ ne sufiĉe disvastigita: tial li kreis en Kordova dudek sep

novajn lernejojn, kie malriĉaj infanoj estis senpage edukataj, ĉar li mem pagis la profesorojn (**).

La Kordova Universitato estis dum tiu epoko unu el la plej famaj de la tuta mondo. En Ĥaĉmoskeo, kie oni eksplikis la lecionojn, Abū Bekr ibn Moauia instruis pri la tradicioj rilate al Mohameto kaj Abū Ali Cali, el Bagdado, eksplikis pri la antikvaj araboj kaj ties proverboj, idiomo, poezio, ktp.. La Gramatikon instruis Ibn al-Cutia, verŝajne la plej erudicia homo pri gramatiko en Al-Andalus kaj eble en la tuta araba mondo. Ankaŭ aliaj sciencoj estis instruataj de renomaj homoj el inter la plej eminentaj... Granda parto el la lernantaro studis la tiel nomatan "fif", t.e., Teologio kaj Juro, ĉar per tia studo oni atingis pli rapide multprofitajn postenojn.

Tiu Universitato ankaŭ estis grava fonto el kiu ŝprucis plejadoj da eminentaj poetoj. La plej gravaj sciencistoj de la mondo venis al Kordovo por informiĝi pri la lastaj eltrovoj de la Scienco, kaj eble ankaŭ por vivi en la plej altnivela civilizacio de tiu epoko.

Oni povas diri, ke unuafoje en la ekzistado de la araba popolo, arabaj homoj (en tiu ĉi kazo la umajaj regantoj) venkis la tradiciismon de la araboj kreante kune kun hispanoj kaj hebreoj modernan socion ankoraŭ ekzemplan por la nuntempaj generacioj. La troa longeco de la artikolo konsilas min lasi la priskribadon de la poezia temo dum tiu ĉi vivperiodo en Al-Andalus por venonta artikolo, kion mi certe faros baldaŭ.

Al-Hakam forpasis en la jaro 976.

Antonio Marco Botella

(*) Ibn al-Abbar, pĝ. 101-103.

(**) Ibn Adari, pĝ. 256.

Noto de la Redakcio.

Kun bedaŭro ni rimarkis tajperaron en la artikolo "LA BELA SENKOMPARA KORDOVO" de nia revuo "Kajeroj el la Sudo" n-ro 13, 13-a paĝo, 24-a linio: kie oni skribis 113 domoj devus diri 113.000 domoj.

Ni petas senkulpigon!

Ni tutkore dankas al niaj abonantoj la pagon de la jarkotizo kaj al la nepagintoj ni petas, ke ili bonvolu tion fari kiel eble plej baldaŭ. Dankon!

ORIGINALA POEZIO.



El la koto plej mizera
alten grimpas revo-turoj,
en fuĝemo de strukturoj
el filigrano aera,

supren, sor, ek al etera
mondo de svagaj konturoj,
kie feliĉo, plezuroj,
ĝuoj mil kaj am' libera
kirligās en ŝaúm' kimera,
inter klaroj kaj obskuroj,
inter allogaj susuroj
kaj la lontano mistera.

Sakrilegio danĝera!
krias alarme tamburoj,
ludi per ĉi partituroj
atencaj al realo vera;

do, malsupren, re al tera
nesto de naturaj muroj,
pafu vin for, aventuroj,
kotu koto plu mizera.

Ha,
se ĉies
maskoj
forfalus
samtempe...

Sur la tombon
de nia amo,
kiel ĉiudimanĉe,
jam de tri jaroj,
mi lasis hodiaú
mian faskon de floroj
apud la via.

Recenza angulo:

"Ne facilas esti..."



"NE FACILAS ESTI...SLOVENO EN ITALIO"

Aŭtorino: Anita Perič Altherr.

Eldono: Internacia Komitato por etnaj liberecoj.

Volumo n-ro 1 de la serio "Etnoskizoj". 161 pĝ.

j. 1991.-

"Ne facilas esti... sloveno en Italio" estas la titolo de libro -verkita de Anita Perič Altherr, en kiu oni prezentas al ni bazan panoramon pri la vivo kaj cirkonstancoj de la slovena komunumo en Italio. Eble multaj personoj ne konas eĉ la ekziston de tia komunumo en certa teritorio de la itala Respubliko. Ĝuste pro tio la aŭtorino invitas nin konatiĝi iom kun ŝia etna ĉirkaŭmondo.

Nuntempe la nombro da slovenoj situas proksimume je du milionoj. La plimulto loĝas en la jusa sendependa slovena Respubliko (ĝis antaŭ ne multe parto de la jugoslava Federacio). Sed ankaŭ en Italio estas slovenoj (ĉirkaŭ cent mil personoj). Ili loĝas precipe en la parto de Italio kiu najbaras kun la slovena Respubliko. Triesto, ĉe la Adriatika Maro, estas la ĉefa urbo de tiu zono.

La slovena lingvo estas slava lingvo apartenanta al la okcidenta grupo (kiel slovaka, ĉeĥa kaj pola). Kiel kuriozaĵon oni povas mencii, ke la slovena gramatiko havas tri nombrojn: singularon, dualon kaj pluralon. La plej antikvaj slovenlingvaj tekstoj rilatas al religiaj skribaĵoj. Sed la vera renaskiĝo okazis dum la romantisma periodo. En tiu epoko aperis kelkaj el la plej gravaj verkoj slovenlingvaj. La libro de Anita Perič inkluzivas ampleksan parton de diversaj eroj de la slovena literaturo. Inter ili aperas fragmentoj de France Prešern, poeto kiu verkis la slovenan himnon. Indas reprodukti ĉi tie unu el ĝiaj strofoj almenaŭ:

Ke vivu ĉiuj gentoj
eksopirantaj pri la kor',
ke trans la kontinentoj
disput' elmondo estos for,

Zivé naj usi naródi,
ki hrpené doĉkat' dan,
ko, koder sonce hodi,
prepir iz svéta bo pregman,

en liber'
ne barbar'
ĉe limo estu nur najbar'!

ko rojak
prost bo usak,
ne vrag, le sosed bo mejak!

En ĉi tiu libro Anita Perič ankaŭ prezentas al ni trarigardadon pri la historia disvolviĝo de la italaj slovenoj kaj iliaj problemoj. Oni povus konkretigi la ĉefajn problemojn: la konflikto inter du tendencoj, unuflanke, la slovenoj volas konservi sian memecon; kaj aliflanke, la italaj instancoj pli malpli senkonscie aŭ ne sufiĉe protektas aŭ simple atakas (tio variis laŭ diversaj momentoj) tian diversecon. Estas la klasika konflikto de etna minoritato kiu baraktas por defendi sian identecon kontraŭ la ekstera asimilado. Tiu lukto kelkfoje havis nuancojn speciale tragikajn. Dum la faŝisma periodo okazis la plej nigraj momentoj, kaj tiamaj ekstermkoncentrejoj atestas ankoraŭ pri tiu tragika koŝmaro.

Per ĉi tiu libro Anita Perič intencas oferti materialon por koni la cirkonstancon de ŝia etno. La pli bona interkonatiĝo de la popoloj estas konvena vojo por progresi ĝis pli bona kaj respektama kunvivado inter la popoloj. Renato Corsetti skizas interesan enkondukon de ĉi tiu libro. Tie, li asertas: "Neniigo de ies kulturo, de ies animo, estas nur malmulte pli malgrava ol fizika ekstermo de malsamuloj".

Tamen, antaŭ ol fini, mi devas fari lastan konfesion: Ne facilas esti...rezencisto de tiu ĉi libro por ia persono kiu, kiel mi, ĝenerale ne spertas specifan aparteno-senton al konkreta lando aŭ al kolektiva koncepto pri kulturo aŭ tradicio. Alivorte, probable, je la komuna senco de "patrujo" mi ne sentas min tro patrujema (eble pro mia individueca sento pri la ekzisto). Pri la antikvaj gekristanoj oni diris, ke por ili iu ajn patrujo estis stranga, kaj iu ajn stranga loko estis ilia patrujo. Tiusence, mi simpatias pli al la kosmopolitistaj perspektivoj: "Mia patrujo estas la tuta mondo" (Dante); "por mi ne estas alia patrujo ol la homaro" (F.Montseny). Ĉi tio je komenca alproksimiĝo, ĉar pli profunde kaj pli sincere mi apartenas al la personoj kiujn mi vere amas, mi apartenas ne al iu lando sed al pli granda spaco: al la patrujo de la koro.

Lorenzo Noguero

**Kajeroj —
— el la Sudo**



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Str. Av. Compromiso de Caspe, 26, 1^º
50002 - Zaragoza (Hispanio)

Depósito legal: Z - 2398 - 88

Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas, S.A.